

# Espero Katolika



**Numero 4-6/2011**

**Aprilo-Junio 2011**



**Sur la kovrilo:** *La belega portreto de Johano Paŭlo la 2a, brodita en tapeto, pendis el la centra logio de la vatikana Baziliko, en la tagoj de lia beatproklamo (v. p. 26).*

## ENHAVO

### PASKO 2011

La <b>beno</b> de la Papo al la homaro	23
La 20a sinsekva <b>ĉeesto</b> de Esperanto dum “Urbi et orbi”	25

### JOHANO PAŬLO LA 2a ESTAS BEATA

<b>Benedikto la 16a</b> predikas pri sia antaŭulo	26
La tagoj de la beatproklamo en Romo: <b>ciferoj</b> de granda evento	27
La nova <b>tombo</b> de beata Johano Paŭlo la 2a	29
<b>Esperanto</b> en ekspozicio omaĝe al la nova beatulo	29
<b>Johano Paŭlo la 2a kaj Esperanto</b>	30

<b>MORTIS LA HINDA SAI-BABA:</b> atesto de eksa sekvanto	32
“ <b>SALUTON MARIA</b> ”: kiel estiĝis ĝia traduko en Esperanto	33

<b>LUMO FINE DE LA MONDO:</b> laŭ la “Jakoba vojo” kaj al Finisterre	36
--	----

<b>FUNEBRE</b>	38
----------------	----

<b>KELI-kongreso</b> en la 100a datreveno de ĝia starigo	39
--	----

### SURVOJE AL LA IKUE-KONGRESO 2011

<b>Ludbreg:</b> la urbo de la Eŭkaristia miraklo	40
--	----

Radio Vatikana, 35

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> \* Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” \* Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio  
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

**Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma**

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

**Presejo - Tipografia**

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

**Respondeca Direktoro - Direttore responsabile**

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio  
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Sac. Stefano Hawkes-Teeple - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.

## “Ke la resurektinta Kristo malfermu la vojon de libero, de justeco kaj de paco”

Miriado de floroj, senditaj de Nederlando, inundis placon sanktan Petron en Vatikano estigante, en la dimanĉo de Pasko 2011, allogan harmonion de koloroj kaj parfumoj dum la paska Meso ĉefcelebritate de Papo Benedikto la 16a kun la partopreno de preskaŭ 100.000 fideluloj.

Miloj da rozoj, tulipoj, lilioj, narcisoj, hiacintoj kaj aliaj floroj reelvokis la belecon de unueco

pliriĉigita de diverseco. Ĉi-jare, la 24an de aprilo, la Pasko de la Eklezioj de Okcidento kaj de Oriento koincidas: tiel ke post la Evangelio, ĥoruso el Oriento ĉantis fronte al Benedikto la 16a bizancan paskan kanton.

Post la Meso la Papo aperis je la centra loĝio de la vatikana Baziliko por la paska Mesaĝo kaj la beno “Urbi et orbi”. “Kristo resurektis!” – li anoncis: post 20 jarcentoj daŭre eĥas la anonco kiu ŝanĝis la historion. Kaj la tuta universo hodiaŭ ĝojas “implikita en la printempon de la homaro” elaĉetita de Kristo. Ankoraŭ hodiaŭ “eĉ en nia epoko de ultrateknologiaj komunikoj” la fido de la kristanoj baziĝas sur la atesto de



personoj, kiuj vidis la resurektintan Kriston.

“La resurekto de Kristo – memorigis la Papo - ne estas frukto de elpenaĝo, de mistika sperto: ĝi estas okazintaĝo, kiucerte preterpasas la historion, sed kiu okazas en iu preciza momento de la historio kaj lasas en ĝi neforviŝeblan spuron. La lumo kiu duonblindigis la gardistojn ĉe la tombo de Jesuo trairis la tempon kaj la spacon. Ĝi estas lumo dia, kiu disŝiris la

mallumon de la morto kaj portis en la mondon la brilegon de Dio, la brilegon de la Vero kaj de la Bono”.

La Resurekto de Kristo donas forton kaj signifon al ĉiu homa espero, sed bedaŭrinde – aldonis Benedikto la 16a – “la paska haleluja ankoraŭ kontrastas kun la veoj kaj krioj kiuj venas el tiom multaj dolorigaj situacioj: mizero, malsato, malsanoj, militoj, perfortoj. Kaj tamen, ĝuste pro tio Kristo mortis kaj resurektis! Tial, ĉi tiu mia mesaĝo volas atingi ĉiujn kaj, kiel profeteca anonco, precipe la popolojn kaj la komunumojn kiuj trasuferas horon de turmentego, por ke Kristo Resurektinta malfermu al ili la vojon de libero, de justeco kaj de paco”.

Benedikto la 16a preĝe alvokis repaciĝon por la tuta mondo, aparte por la Sankta Lando, Mezoriento kaj Ebura Bordo “por ke la lumo de la paco kaj de la homa digno venku la mallumon de la dividiĝo, de la malamo kaj de la perfortoj”. Por Libio la Papo deziris ke la diplomatio kaj la dialogo anstataŭu la armilojn kaj oni plifaciligu, en la nuna milita situacio, la aliron de la homamaj helpoj al tiuj kiuj trasuferas la sekvojn de la kunpuŝiĝo.

“En la Landoj de Norda Afriko kaj de Mezoriento, ĉiuj civitanoj - kaj aparte la gejunuloj - klopodu akceli la komunan bonon kaj starigi sociojn, kie la malriĉeco estu venkita, kaj ĉiu politika elekto estu inspirata de la respekto al la homa digno”. Li petis, ke al la multenombraj forfuĝintoj kaj rifuĝintoj, kiuj venas el diversaj afrikaj Landoj kaj estis devigitaj forlasi siajn plej karajn amataĵojn, alvenu la solidareco de ĉiuj. “La bonvolaj homoj estu iluminataj kaj malfermu sian koron al la akcepto, por ke en maniero solidara kaj interkonsentita oni povu helpi la neprajn bezonojn de tiom multaj gefratoj. Al tiuj kiuj sindonas en malavaraj streboj kaj proponas ekzemplodonajn atestojn en ĉi tiu direkto, alvenu nia subteno kaj aprezo”.

La Papo preĝe alvokis konsolon kaj



esperon por Japanio detruita de tertremo kaj cunamo kaj por la landoj kiuj estis elprovitaj de naturaj katastrofoj. Li adresis sian penson al la kristanoj persekutataj pro sia kredo je Sinjoro Jesuo: “La anonco de lia venka Resurekto enmetu en ilin kuraĝon kaj fidon”.

Fine li invitis iri malantaŭ Jesuo, en ĉi tiu mondo vundita, kantante haleluja. “En nia koro estas ĝojo kaj doloro, sur nia vizaĝo ridetoj kaj larmoj. Tia estas nia surtera realaĵo. Sed Kristo resurektis, estas viva kaj iras kun ni. Pro tio ni kantas kaj iras, fidelaj al nia sindevigo en ĉi tiu mondo, kun la rigardo turnita al la Ĉielo”.

Sekve la Papo adresis paskajn bondezirojn en 65 lingvoj, inkluzive de Esperanto: *Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta.*



En placo sankta Petro ĉeestis, kiel estas tradicio, esperantistoj kiuj alten levis la panelojn kiuj konsistigas la vorton “Esperanto”. Ĉi-jare tamen la samtempa televida elsendo ne montris ilin kiam la Papo adresis sian paskan bondeziron en Esperanto: oni povis vidi la panelojn tre fone dum la fina solena beno de la Papo.



Gianni Conti cerbumis longtempe: li ne ŝatis, ke post la E-lingva bondeziro farita de la Papo Kristnaske kaj Paske (ekde 1994) neniu dankema aplaŭdo aŭ resaluto leviĝis el la placo. Tial, Kristnaske de 2001 kun malmultaj aliaj volontuloj li vojaĝis al Romo el Milano kaj por la unua fojo la vorto "Esperanto" aperis meze de la multegaj tolstrioj kaj flagoj de la fideluloj okaze de la beno "Urbi et orbi". Komenciĝis la longa serio de la ĉeestoj de esperantistoj en placo sankta Petro, kiuj elmontras grandan sinoferecon: kelkaj el ili loĝas en Romo, sed Gianni Conti, Giovanni Daminelli kaj Felice Sorosina ĉiufoje alfrontas longan vojaĝon ire kaj revene (30 horoj ekster hejmoj).

En 2001 la verda skribo "Esperanto, la internacia lingvo" konsistis el tolstrio, kiu tamen ne estis bone videbla. Por vasta spaco kiel tiu de placo sankta Petro en Vatikano necesas io "vasta" kaj tio ne estis "problemo". Gianni kutimas pensi "grande" kaj samtempe li ne malhavas inventemon. Jam en la posta Pasko (2002) por la unua fojo aperis la famaj paneloj, "diserigo" de la vorto Esperanto: ĉiu ĉeestanto tenas unu literon. Nu, ne: por esti precizaj, 2 literojn. La genieco de la ideo kuŝas en tio, ke ĉiu panelo estas aranĝita por ke ambaŭflanke la vorto "Esperanto" estu legebla, blanke aŭ flave, depende de la loko el kiu oni alrigardas ilin. Do, la panelo de la komenca "E" havas dorse la finan "O" kaj tiel plu.

La aranĝo de la paneloj adaptiĝis je la aparta loko kaj momento de ilia uzo. Ekzemple, pro sekurecaj kialoj, en la vaticanan placon dum amasaj ceremonioj oni ne povas porti metalajn objektojn, kiuj povas esti uzataj por vundi personon. Tiel Gianni aĉetis plastajn stangetojn, kiuj estas malpezaj ĉar ili estas malplenaj interne. Por igi pli komforta ilian transporton dum la pli ol 500-kilometra fervoja vojaĝo al Romo, ili konsistas el (hodiaŭ 5) divideblaj kaj rekunmetebaj partoj. Ankaŭ la literoj estas facile kunvolveblaj. Kaj la metaldetektoro de la policanoj ne sonoras kiam oni kontrolas tiujn sakojn.

Tamen la policanoj almenaŭ dufoje intervenis, je la unuaj ĉeestoj. En unu kazo policano sendiskute konfiskis la panelojn. Nur la interveno de la roma esperantisto Elio Bonomolo, kiu certigis, ke oni ricevis "permeson de mons-ro Sapienza (=saĝeco)" konvinkis la superulon de la policano redonigi la panelojn. Pli kurioza estis en alia jaro la interveno de policanino (kolonelo) kiu nepre volis kontroli la panelojn por konstati ĉu per ili eblas fari anagramon kaj tiel elmontri fian vorton...

Ĉu Esperanto fariĝis familia? Kiu scias? Fakte estas, ke de jaroj la policanoj ne pridemandas la esperantistojn, kiuj tamen havas en poŝo foton de la antaŭaj ĉeestoj por eventuale pruvi sian bonan celon.

Ilia ĉeesto helpas ankaŭ la televidan elsendon: dum ĝi la reĝisoro alcelas la telekameraojn dum la plurlingvaj salutoj de la Papo, por filmi la koncernan lingvan grupon. Kun Esperanto la kunigo "saluto=grupo" estas facila, ankaŭ ĉar ĉiufoje Ranieri Clerici atentigas la teknikistojn de la televidstacio pri la ebleco trafi la ĝustan momenton. Ĉi-jare pro nervozeco la telekameraisto miskomprenis tion, kion diris al li nia samideano; sekve la elsendo ne montris frontloke la panelojn.

Estas pluraj la aliaj rakontindaj eventoj: en 2005 ne okazis la atendata bondeziro – je Pasko la malsana Johano Paŭlo la 2a ne povis alparoli la fidelulojn; je Kristnasko Benedikto la 16a portempe limigis la nombron da bondeziroj; en Pasko 2006 okazis erara monro de la paneloj dum hispanlingva saluto; en Pasko 2008 okazis ŝtormo kaj la esperantistoj rezistis sub la pluvego ĝis kiam tio ne plu eblis ĉar ili estis plenplene banitaj kaj la placo intertempe malpleniĝis.

Ĉu ĉiuj ĉi eventoj povas malaperigi la entuziasmon de Gianni de liaj kunuloj? Ni certas, ke ne. Kaj ni atendas ilin venontan Kristnaskon, en la deka datreveno de ilia unua ĉeesto. Ĝis tiam: koran dankon, karegaj gefratoj, pro Via sinofereca atesto.

[http://www.ikue.org/menuo\\_urbietorbi.html](http://www.ikue.org/menuo_urbietorbi.html)

*Benedikto la 16a beatproklamis Johanon Paŭlon la 2an*

## **GIGANTO, KIU INSTRUIS AL LA KRISTANOJ NE TIMI ESTI KRISTANOJ**



*“Auctoritate Nostra Apostolica facultatem facimus ut Venerabilis Servus Dei Ioannes Paulus II, papa, Beati nomine in posterum appelletur eiusque festum die altera et vicesima Octobris in locis et modis iure statutis quotannis celebrari possit. In nomine Patris et Filii et Spiritus Sancti”.*

La sama grandega popolamaso de la 8a de aprilo 2005, kiu priploris kaj en mil lingvoj volis Papon Wojtyła sankta, denove plenigis la unuan de majo 2011 ĉiujn angulojn kaj spacojn de placo sankta Petro, de la antaŭa strato “della Conciliazione” kaj de ĉiuj romaj placoj en kiuj eblis spekti per televidaj ekranoj la latinlingvan formulon de la beatproklamo:

«Per nia apostola aŭtoritato ni koncedas, ke la honorinda Diservanto Johano Paŭlo la 2a, Papo, ekde nun estu vokata beata kaj ke oni povu celebri lian feston en la lokoj kaj laŭ la reguloj de la juro, ĉiujare la 22an de oktobro. En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito».

Kiam, post la proklamo, oni malvualis la fotografajon de la amegata Papo en la centra loĝio de la vatikana Baziliko, en kiu iam li aperis “veninte de malproksime”, la ĝojo ĝis tiam bremsita de la fideluloj (unu miliono kaj pli) senbridiĝis per longa aplaŭdo kaj multe da larmoj. Multegaj el ili tranoktis surstrate por esti la unuaj kiuj eniros placon sanktan Petron por ĉeesti unuavice dum la beatproklamo.

Interne de la Baziliko, fronte al la ĉefaltaro, en soleco interrompita nur de la televida filmado, estis la ĉerko de Johano Paŭlo la 2a; sur ĝi estis malfermita la “Evangeliaro de Lorsch”, miniatura kodekso de la 8a/9a jc.

“Giganto kiu per sia atesto de kredo, amo kaj apostola kuraĝo, akompanata de granda humaneco, helpis la kristanojn de la tuta mondo ne timi diri sin kristanoj, ne timi aparteni al la Eklezio kaj paroli pri la Evangelio”: ĉi tiu estas la centra penso, kiun Benedikto la 16a dediĉis al Johano Paŭlo la 2a dum la prediko de la Meso de li celebrita por la beatproklamo de lia antaŭulo. “Jam en tiu tago de la funebro – diris Benedikto la 16a – ni sentis, ke estis la parfumo de lia sankteco kaj la Popolo de Dio elmontris multmaniere sian omaĝon al li. Pro tio mi deziris, ke nepre respektante la leĝaron de la Eklezio, la proceso por lia beatproklamo povu okazi laŭ ioma rapideco. Kaj jen la atendita tago alvenis, ĝi alvenis frue: ĉar tiel plaĉis al la Sinjoro, Johano Paŭlo la 2a estas beata!”. Ĉi tiu lasta frazo estis eldirita de Benedikto la 16a per laŭta voĉo, estigante la entuziasmon de la fidelularo.



Kaj belega estis la rigardo al placo sankta Petro: oni timis pluvon, sed abrupte la ĉielo fariĝis intense lazura kaj suno aperis kaj varmigis la ĉeestantojn: ĝi briligis la arĝentan relikvejon en kiu estas la sango de Papo Wojtyła: fratino Marie Simon-Pierre Normand – la religiulino miraklita per la propeto de Johano Paŭlo la 2a – alportis ĝin al la altaro dum unu el la pli intensaj momentoj de la ceremonio.

Benedikto la 16a memorigis per kreskanta admiro kaj amemo la eksterordinaran parabolon, kiu kondukis papon Wojtyła el la tero al la Ĉielo. Unu frazo en la pola donis la centran kernon de la papado de Johano Paŭlo la 2a: “ĉi tiu ekzemplodona filo de la pola nacio helpis la kristanojn de la tuta mondo ne timi diri sin kristanoj, aparteni al la Eklezio kaj paroli pri la Evangelio. Unuvorte: li helpis nin ne timi la Veron, ĉar la Vero estas garantiaĵo de libereco”.

#### CIFEROJ DE GRANDA EVENTO

Por la beatproklamo alvenis al Romo unu miliono kaj kvincentmil fideluloj. 87 estis la oficialaj delegacioj de diversaj landoj, kun 16 ŝtatestroj kaj reprezentantoj de 5 regantaj reĝoj. 2300 estis la ĵurnalistoj akredititaj, reprezente de 101 landoj. Inter la amaskomunikiloj portempe oficiale akredititaj ĉe la gazetara salono de la Sankta Seĝo estis ankaŭ **Espero Katolika** (n-ro 111 en la tuta listo kun pluraj centoj da titoloj!), per sia reprezentantino Marija Belošević.

Imponaj estas la ciferoj, kiujn publikigis la Komunumo de Romo pri la evento: aktivis 4.000 volontuloj kune pli ol 6.500 prizorgantoj de publika sekureco, 2.500 ŝoforoj por la urbaj transportiloj, 2.000 kuracistoj kaj flegistoj. En la inform-budoj 350 laborantoj disdonis du milionojn da urbaj mapetoj kaj flugfolioj; tra la urbo estis 30.000 aŝiŝoj kaj indikiloj, mil standardoj por ornami; du milionoj da boteloj de mineralakvo estis donacitaj.



La kortuŝiĝo de la aŭskultantoj estis pli forta ol ĉia malkomfortaĵo kaj ĝi pli kaj pli kreskis ĉiufoje kiam Benedikto la 16a lasis, ke Johano Paŭlo la 2a denove parolu al tiuj, kiuj neniam ĉesis sekvi liajn instruojn. “Ne timu! Malfermu, eĉ malfermegu la pordojn al Kristo!” tion kion la ĵus elektita Papo petis al ĉiuj, li mem faris kiel unua: li malfermis al Kristo la socion, la kulturon, la politikajn kaj ekonomiajn sistemojn, renversigante per la forto de giganto – forto kiun li ĉerpis el Dio – tendencon kiu aspektis nerevenebla”. “Per tiu forto – daŭrigis Benedikto la 16a – Johano Paŭlo la 2a gvidis la Popolon de Dio trapasi la sojlon de la tria jarmilo, tiun sojlon de la espero, pri kiu li parolis kaj kiu dum jardekoj estis barita de ideologioj kontraŭ kristanismo”. “Tiun forton de espero, kiun oni iel transdonis al marksismo kaj al ideologio de progreso, li prave depostulis por Kristanismo, redonante al ĝi la aŭtentikan aspekton de espero, travivenda en la historio laŭ spirito de ‘advento’, per persona kaj komunuma vivo orientata al Kristo, pleneco de la homo kaj plenumo de lia sopiroj al justeco kaj paco”.

Kortuŝita ankaŭ li, Benedikto la 16a revuis fine siajn rememorojn kiel amiko kaj kunlaboranto de Johano Paŭlo la 2a, reliefigante, ke Papo Wojtyła estis homo kiu ĉiam serĉis la kontakton kun Dio, kaj kiu kapablis resti alkroĉita al la Kruco de Kristo ĝis la lasta restinta forto. “Dum jaroj Johano Paŭlo la 2a estis “Roko”, kiu vidis la falegon de muregoj, kiujn oni taksis eternaj; ĝis kiam la energio de la fido estis elĉerpita de suferado”.

“La Sinjoro iom post iom senigis lin de ĉio, sed li ĉiam restis “roko”, kiel Kristo volis lin. Lia profunda humileco, radikigiĝinta en la intima unueco kun Kristo, ebligis al li daŭre gvidi la Eklezion kaj donis al la mondo mesaĝon des pli parolivan, ĝuste en la epoko, kiam liaj fizikaj fortoj malpliigis. Tial li realigis laŭ eksterordinara maniero la vokiĝon de ĉiu pastro kaj de ĉiu episkopo: fariĝi unu kun tiu Jesuo, kiun ĉiutage li ricevas kaj donas en la Eŭkaristio”.

La lasta saluto estis improvizita preĝo: “Beata vi, amata Papo Johano Paŭlo la 2a, ĉar vi kredis. Daŭre, ni vin preĝas, subtenu el la Ĉielo la fidon de la Popolo de Dio. Multajn fojojn vi benis nin en ĉi tiu placo. Hodiaŭ ni preĝas al vi: sankta Patro, benu nin, Amen.

*La maldekstra kolonaro de placo sankta Petro ornamita per giganta portreto de Johano Paŭlo la 2a kaj per lia fama frazo: “Malfermegu la pordojn al Kristo”*








## La nova tombo de beata Johano Paŭlo la 2a

Post la fino de la omaĝado de fideluloj, kiuj seninterrompe pasis fronte al la ĉerko ĉe la ĉefaltaro de la baziliko de sankta Petro, la korpo de beata Johano Paŭlo la 2a, kiu restis dum 6 jaroj en la vaticanaj grotoj, ripozas en la nova tombo en la kapelo de sankta Sebastiano, interne de la baziliko. La 3an de majo, je la 7a matene, post trifoje kantita preĝalvoko “Beate Ioanne Paule”, oni trapreĝis la preĝon de la beatulo kaj oni incensis.



Sekve la laboristoj metis la grandan tomboŝtonon el blanka marmoro, sur kiu estas gravuritaj la vortoj: “Beatus Ioannes Paulus PP. II” (fotoj de Marija Beloŝević).

La eltombigo de la triobla ĉerko el la vaticanaj grotoj okazis la 29an de aprilo. Ĝi restis fronte al la tombo de sankta Petro apostolo ĝis la 1a de majo kiam oni metis ĝin ĉe la ĉefaltaro de la vatikana Baziliko por la omaĝado de la fideluloj. La unua estis papo Benedikto la 16a tuj post la beatproklamo.



“Johano Paŭlo la 2a: omaĝo de Benedikto la 16a okaze de la beatproklamo” estas la titolo de ekspozicio en la t.n. “branĉo de Karolo la granda” de la vatikana Baziliko. En ĝi estas multaj fotoj, dokumentoj, atestiloj pri la vivo de Karol Wojtyła – papo Johano Paŭlo la 2a - ekde infanaĝo. Inter la ekspoziciataj tradukoj de liaj verkoj estas la esperantlingva eldono de lia poemaro “La roma triptiko” (foto de Marija Beloŝević).



## JOHANO PAŬLO LA 2a KAJ ESPERANTO

Aldone al nia “fideleco je Petro”, por ni katolikaj esperantistoj ekzistas plia motivo de amemo kaj dankemo rilate al Johano Paŭlo la 2a. Li elmontris - daŭrigante la longan serion da patrecaj subtenoj de la antaŭuloj - multe da proksimeco kaj kuraĝigo al la idealoj de la katolika E-movado, kaj tio jam antaŭ la papeco. Ĉiuj ĉi personaj elmontoj de simpatio kaj atento estas por ni verŝajne la plej karmemoraj el ĉiuj subtenoj, kiujn la Eklezio dum la historio donis al katolika E-movado kaj al Esperanto.

Ĉiuj scias, ke Esperanto estas apreciata en Pollando, en kies katolika medio ĝi estas uzata de jardekoj. En tiaj cirkonstancoj ne estas mirige, ke la tiama Metropolito de Krakovo, kardinalo Wojtyła, sekvis kun simpatio la katolikan E-movadon. Tio kulminis en 1977, per la akcepto de la Alta Protektado de la 37a IKUE-kongreso, al kiu li sendis jenan mesaĝon (legeblan en la libro de tiu Kongreso): *“Patro Sankta, gardu en via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni. (Joh 17,11). Kiel Jesuo Kristo preĝis por siaj disĉiploj pri la unueco, tiel same mi en la nomo de la Eklezio preĝas viaintence. Unu kredo kaj unu amo helpu al vi unuigi la disbatitan mondon en unu ŝafaron sub unu Paŝtisto. Unu supernacia lingvo - Esperanto - ankaŭ servu efike al ĉi tiu nobla celo. En mia propra nomo kaj en la nomo de multaj favoraj al vi polaj episkopoj, mi benas vian agadon kaj deziras al vi la Dian gracon”.*

Okaze de la Kongreso, la tiama kardinalo Wojtyła estus devinta ne nur ĉeesti, sed eĉ celebri la Sanktan Meson kaj prediki en Esperanto. Papo Paŭlo la 6a, per telegramo, kiun li sendigis de mons-ro Innocenti, rajtigis kardinalon Wojtyła celebri tiun Meson en Esperanto. Ĉio estis jam preta, kiam neatendita cirkonstanco devigis la kardinalon rezigni pri la aranĝo. Sed ni legu la vortojn, kiujn li mem tre delikate skribis (en pola lingvo) al la organiza komitato: *“Bonvolu akcepti mian senkulpigon pro la foresto la 18an de aŭgusto sur la Hela Monto. Neatendite por ni ĉiuj okazis en tiu tago la enterigo de la sankte memorigata pastro arkiepiskopo Antonio Baraniak, la metropolito de Poznan. Kvankam la funkcioj konfiditaj al mi fare de la organizantoj de la Kongreso estas ege honoraj kaj gravaj kaj mi tre volus ilin plenumi, nepre necesa estas mia partopreno en la funebraj ceremonioj, ligitaj kun la sepulto de la metropolito de Poznan, tre proksima al ni ĉiuj kaj meritplena por la Eklezio en nia patrujo. Tial mi petas la Prezidiumon kaj ankaŭ ĉiujn estimindajn Kongresanojn kompreni la motivon de mia foresto kaj pardoni ĝin.*



*La ĉefcelebranton de la Sankta Meso elektu la kongresa Prezidiumo laŭ sia bontrovo. Spirite kunligita kun la preĝo kaj la laboroj de la Kongreso, mi esprimas la esperon, ke sub la sankta patroneco de la*

*3.9.1997: Papo Johano Paŭlo la 2a renkontas post la ĝenerala aŭdienco parton de la IKUE-estraro: Miloslav Švábek, Antonio De Salvo kaj pastro Duilio Magnani.*

*Helmonta Sinjorino, ĝi donos benatajn fruktojn”.*

Alian esprimon de simpatio kardinalo Wojtyła faris malmultajn monatojn antaŭ la elekto al papado, kiam li bondeziris al EK okaze de la 75-jara datreveno de nia revuo (v. EK 8/1978, p. 132). Tre afablajn vortojn li ankaŭ skribis, pli antaŭe, por danki por la sendo al li de kelkaj fotoj faritaj de la tiama landa reprezentanto de IKUE por Germanio, d-ro Josef Kondor.

En EK 12/1978, la tiama redaktoro d-ro De Salvo skribis: *“ni varme esperas, ke Papo Wojtyła, havos por ni, katolikaj esperantistoj, la saman simpation, kiun li montris al ni kiel kardinalo, kaj eventuale eĉ iom pli multe”*. Neniu dubo, ke la espero siatempe esprimita de d-ro De Salvo konkretiĝis. Dum la papado de Johano Paŭlo la 2a la katolika E-movado travivis multajn gravajn momentojn de sia historio: agnosko de IKUE kiel asocio laŭ papa juro, aprobo de la Meslibro kaj Legafaro, enigo de Esperanto inter la lingvoj uzataj de la Papo Kristnaske kaj Paske. Kun Johano Paŭlo la 2a Esperanto fariĝis ne nur lingvo “aprobata”, sed ankaŭ “parolata” de la katolika Eklezio.

La unua fojo, kiam Papo parolis en Esperanto dum publika ceremonio okazis en Ĉenstoĥovo, kadre de la monda junulara tago: la 14an de aŭgusto 1991, vespere, okazas lia bonveniga saluto. *“Mi donas ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama Patro en la nomo de Kristo, vero de la homo!”*

La postan tagon, ferme de la celebroy, la Papo denove adresas siajn plurlingvajjn salutojn al la gejunuloj en Ĉenstoĥovo. En Esperanto li diras: *“Karegaj junuloj! La sperto de kredo, travivita ĉe la piedoj de la “Nigra Madono” restu neforigebla gravurita en viaj koroj. Sanktega Maria akompanu Vin”*. Nepras memori, ke pro la amaso da junaj ĉeestantoj la programo de la ceremonioj prokrastiĝis, tiel ke la Papo devis tranĉi kelkajn el la antaŭviditaj plurlingvaj salutoj, sed li ne saltis tiun en Esperanto.

Ekde Pasko 1994 la Papo aldonas Esperanton al la plurlingvaj bondeziroj “Urbi et orbi” (al Romo kaj al la mondo). Ekde tiam je Pasko la salutoj estas: “Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta”; je Kristnasko: “Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron”.

En 1997 la IKUE-kongreso okazas en Romo dum la komencaj 3 tagoj kaj la kongresanoj partoprenas en la ĝenerala aŭdienco en placo Sankta Petro de la 3a de septembro. Al ili Johano Paŭlo la 2a adresis sin en Esperanto per la vortoj: *“Mi ĝojas bonvenigi la responsulojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista engaĝitajn en sia kvindeka Kongreso. Karegaj, la temo de via renkonto reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco, kiu estas ĉe la bazo de la lingvo kiun vi kulturis”*. Alia papa saluto al IKUE-kongresanoj ripetiĝos en la jaro 2000, sed en la itala lingvo (ĝenerala aŭdienco de la 06.09.2000).

La lastan fojon, kiam Johano Paŭlo la 2a uzis Esperanton estis Kristnasko 2004: li faris la E-lingvan bondeziron per penanta tono pro malsaneco. La postan Paskon (la 27an de marto 2005) li aperis je la fenestro de sia privata kabineto por paroli al la fideluloj: per superhoma klopodo li provis eldiri vorton, sed el la buŝo de homo jam tute malsana kaj baldaŭ mortonta eliris nur gorĝa krio. 6 tagojn poste li iris al la Domo de la Patro.

La kondolenco de la esperantistoj – el ĉiuj kredoj kaj ankaŭ el nekredantoj - montriĝis per la multaj kondolencaj mesaĝoj kaj personaj atestoj, kiuj atingis la Centran Oficejon de IKUE dum la tagoj de funebro: ili estas konservataj en la retejo de IKUE (<http://www.ikue.org/papoj/johanopaulodua/esperantistoj.html>), kvazaŭ “verdstela” monumento de amemo.

*Sai-Baba (Sathya Narayana Raju), hindo konata en la tuta mondo kaj taksata de siaj sekvantoj kiel vivanta dio, mortis 85-jaraĝa la 24/4/2011. Li komencis sian predikon en la 60aj jaroj de la 20a jc. kaj de tiam oni kalkulis preskaŭ dek milionojn da liaj fideluloj en la tuta mondo, inkluzive de pluraj gravuloj de politiko kaj famaj artistoj. Li estis debatata figuro, kiu dum longa tempo ankoraŭ diskutigos la homojn: restas fakto, ke surbaze de la kristana principo laŭ kiu Jesuo estas la lasta kaj definitiva Revelacianto de Dio, la kristanoj ne povas akcepti la doktrinojn de Sai-Baba. Pri li ĉiam estis kaj estos kontrastaj opinioj: okaze de lia morto la hinda ĉefministro difinis lin “spirita estro kaj ikono” sed okcidentaj amaskomunikiloj ne prisilentis la fortajn kritikojn kaj eĉ akuzojn kontraŭ li faritajn de eksaj sekvantoj. Unu ateston kolektis kaj esperantigis antaŭ kelkaj jaroj pastro Battista Cadei.*

## EL SAI-BABA AL KRISTO

*(resuma atesto de iu viro, kiun ni nomos Marko)*

«Dum ĉirkaŭ kvin jaroj mi estis membro de sekto, kiu siamaniere aliĝis al la religio de Sai-Baba, kiu sin deklaris avataro tio estas kvazaŭ enkarniĝo de Dio. Plej granda parto de la disĉiploj de Sai-Baba apartenas al granda asocio tre disvastigita tra la mondo. Mi male apartenis al malgranda, aparta sekto, el kelk-centoj da membroj, kiu laŭdire ricevis mesaĝojn kaj viziojn de Sai-Baba, tute sendependa de la granda kaj pli konata internacia organizaĵo de anoj de Sai-Baba. Celo de la sekto estis la preĝado por la suferanta homaro.

La noblaj celoj, la varma akceptado, la bona intenco de la personoj, kiujn mi rekontis, la mirinda ebleco tiel intime kontakti kun Dio, kaj, aldone al tio, la antaŭnelonga aliĝo de kelke el miaj parencoj, allogis ankaŭ min mem aliĝi al la sekto. Mi, kvankam el katolika familio, kaj do baptita kaj konfirmaciita, ne praktikis la kulton, kaj mi konis preskaŭ nenion pri mia religio.

Bedaŭrinde, dum la tempo pasis, la insista cerbo-lavo per tiuj mesaĝoj, pli kaj pli konvinkis min, ke la enhavo de evangelio ne estas vera, ĉar ĝin manipulis la kristana pastraro, kaj ke Jesuo estis homo kiel la ceteraj, kaj ke la doktrino pri la reenkarigiĝo estas pruvita. Dumtempe tamen malkaŝiĝis la negativaj flankoj de la sekto: ties medio estis fermita, kaj havigis amon kaj protekton nur al tiuj kiuj submetiĝis tute al la reguloj.

Laŭgrade ke la tempo plu pasis, la rigora plenumo de la reguloj, kiaj vegetaranismo, rezigno al fumo, al alkoholaĵoj, periodaj pilgrimoj al Hindio, la deviga sekreteco pri tio kio okazas interne de la sekto, fariĝis plej grava el ĉio ajn. Al ni ne estis permesite iel ajn kontakti tiujn, kiuj forlasis la sekton, kiujn oni nomis ribeluloj, kontraŭuloj, disidentoj ktp.

Estiĝis plia kaj plia dependo el la “dia mesaĝo”, kiun la gvidanto ricevis kaj el tiu “orakolo” dependis gravaj decidoj, kiel kuraci malsanojn per kuracistoj aŭ per speciala pulvoro nome “vibuti”, speco de cindro materiigita de Sai-

Baba, eĉ koncerne tre gravajn malsanojn; eĉ la elekto de la profesio, aŭ la nomo de siaj filoj estis decidoj, kiuj dependis de la mesaĝo.

Ĉe ĉiuj konstateblaj malkoheraĵoj de la mesaĝoj, la prognozoj, kiuj ne efektiviĝis, la promesoj, kiuj ne plenumiĝis, oni respondis, ke pri tio kulpas la petanto, kiu ne havas sufiĉe da kredo. Entute, se oni ne forprenis de ni monon (escepte de la kostoj por pilgrimoj al Hindio), oni rabis de ni plej valoran bonon, nome la liberecon pensi kaj agi, krom forpreno de la la kredo en Dio de amo kaj kompato, kiun anstataŭis falsa Dio, senkompata, kiu redonas nur proporcie de tio, kion oni al li ofertas. Mi decidis forlasi tiun religion, kaj per tio, laŭ la reguloj de la sekto, mi faris la “plej gravan kulpon, kiun homo povus plenumi”.

Mi estis malespera, ĉar mi ne plu havis la vivan subtenon, kiun la sekto al mi donis, kaj min turmentis gravaj krizoj de ansio. Bonŝance la Sinjoro al mi renkontigis tre dolĉan knabinon, kiu vizitis la katolikan komunumon de la Renoviĝo en la Sankta Spirito. Ni estis enamiĝintaj, sed, pro mia vivo-maniĝo, nia fianĉeco estis finita kelke da monatoj antaŭ ol mi forlasis la sekton. Mi petis ŝian helpon, kaj mi ricevis de ŝi kaj de ŝia komunumo la tutan senprofitan amon kaj akcepton, kiun mi bezonis. Ili kaj la pastroj, kiujn mi ekkonis, amis min, ne ĉar mi estas homo por konverti al ilia kredo, sed nur por mi, kia ajn mi estas. Tial mi konis la veran amon, tiun de Kristo; tiun amon mi sentis en la fratoj, kiuj amis min, kaj en la Eklezio, kiu min akceptis kiel patrino.

Mi decidis verki tiun ĉi ateston, ĉar espereble ĝi povos eviti, ke aliaj personoj aliĝu al diversaj specaj sektoj. Krome mi volas atesti, ke tre facilas la risko, ke onin allogas magiistoj, astrologoj, homoj, kiuj deklaras sin en kontakto kun Dio kaj do kapablaj koni pasintajn kaj prognozi estontajn eventojn, sed fakte, per dusenca parolmaniero, kaj per iom da psikologio, nur elprofitas la problemojn kaj suferojn de la personoj.



*Ave Maria, gratia plena, Dominus tecum, benedicta tu in mulieribus, et benedictus fructus ventris tui, Iesus. Sancta Maria, mater Dei, ora pro nobis peccatoribus, nunc et in hora mortis nostrae. Amen.*

## KIEL ESTIĜIS LA TRADUKO DE “SALUTON MARIA” EN ESPERANTO

*En majo, monato de Maria, la fideluloj des pli intense sin turnas al sanktega Virgulino. Tiuj esperantistaj kutimas preĝi en Esperanto la plej konatan antifonon al Maria laŭ la teksto de jardekoj uzata. Sed antaŭ ol havi la definitivan tekston en nia movado, la esperantigo de tiom amata preĝo estis unu el la plej pristudataj temoj eĉ post la dua mondmilito. Kaj diversaj versioj daŭre ekzistis longtempe: se la ekzemplo valoras, sciu, ke komence de mia esperantisteco, ankaŭ mi lernis diri “Patrino de Dio” anstataŭ “Dipatrino”... kaj ĝi estis la jaro 1978!*

*En 1960 EK publikigis serion da artikoloj de pastro Wannemakers, kiuj pledis pri “unueca teksto de la ĉefaj preĝoj” fronte al la diversaj ekzistantaj versioj. La dua ĉapitro de lia eseo traktis pri “Saluton Maria”. Interese estas konstati la evoluon de la tradukoj kaj la rimarkojn de pastro Henriko Gerardo Wannemakers (1909-1974), pastro-esperantisto, profesoro pri teologio.*

### Ave Maria

La historio de ĉi tiu teksto estas iom pli simpla ol tiu de la Patro Nia, ĉar nek la Zamenhofa literaturo nek la nekatolikaj Kristanoj posedas ĝin; ĝi estas pure katolika.

Tamen la diverseco inter la ekzistantaj tekstoj estas sufiĉe granda! Jam Jozefo Lintl, paroĥestro en Pfakofen apud Regensburg, Germ., kiu detale studis pri nia temo kaj verkis jam en 1914 kaj 1922, en sia lasta studo (EK 1937, 93) skribas: „Antaŭ mi kuŝas 8 (ok!) diversaj katolikaj preĝlibroj aŭ libretoj, kaj ĉiu alie tradukas la ĉefajn preĝojn, eĉ du preĝaroj de la sama aŭtoro tradukas ilin malsame!”.

Hodiaŭ sur mia skribotablo troviĝas 13 diversaj tekstoj de la Ave Maria! Unuavide tio ŝajnas granda ĥaoso, feliĉe tamen ne tiel estas. Kontraŭe, montriĝas la konstanta zorgo por pli ĝuste kaj pli integre redoni en nia lingvo la altvaloran enhavon de ĉi tiu preĝo:

Jen ni publikigas la du tradukojn de L. de Beaufront el 1893 kaj 1902 (I kaj II) kaj indikas la plibonigojn. E. Peltier proponas: *Saluton* kaj *graco-plena*. Patro Polikarpo: *Maria*. Patro Modesto Carolfi: *benata vi estas*. La unueca teksto de 1924 feliĉe kolektas multajn plibonigojn, sed bedaŭrinde ankoraŭ uzas Mario (VI). En 1929 G. Ramboux pli ĝuste skribas: *por ni, pekuloj*.

En IX ni donas novan proponon kaj aldonas juĝon pri kelkaj detaloj.

I - Mi Vin salutas, / Mario, / plena je favoroj, / la Sinjoro / estas kun Vi; / Vi estas benata / inter ĉiuj virinoj, / kaj estas benata / la frukto de Via ventro / Jesu. / Sankta Mario, / Dipatrino, / preĝadu por ni pekuloj, / nun kaj en la horo / de nia morta. / Amen. (L. de Beaufront, 1893).

II - Mi vin salutas, / Mario, / plena je favoroj, / la Sinjoro / estas kun vi; / vi estas benata /

inter la virinoj, / kaj estas benata / la frukto de via ventro / Jesuo. / Sankta Mario, / Dipatrino, / preĝu por ni pekuloj, / nun kaj en la horo / de nia morto. / Amen. (L. de Beaufront, 1902).

III - Saluton, / graco-plena; / kaj benata estas / la frukto de via karno (E. Peltier, 1907).

IV - Maria, / gracoplena, / Jezu. / Sankta Maria, (P-ro Polikarpo, 1911).

V - plena de favoro / la frukto de via korpo / Patrino de Dio (Fr. Clemente, 1913).

VI - Saluton, / Mario, / gracoplena; / la Sinjoro / estas kun vi; / benata vi estas / inter la virinoj, / kaj benata estas / la frukto de via korpo, / Jesuo. / Sankta Mario, / Dipatrino, / preĝu por ni pekuloj, / nun kaj en la horo / de nia morto. / Amen. (F. Meŝtan, 1924).

VII - benata vi estas / la frukto de via ventro (P-ro M. Carolfi, 1922).

VIII - vi estas benata / la frukto de via karno / preĝu por ni, pekuloj, (G. Ramboux, 1929).

IX - Ave Maria, / plena de graco. / La Sinjoro / estas kun vi. / Benata vi estas / inter la virinoj. / Kaj estas benata / la frukto de via sino, Jesuo. / Sankta Maria, / Patrino de Dio. / Preĝu por ni, pekuloj, / nun kaj en la horo / de nia morto. / Amen. (p. Wannemakers, ndlr).

Kelkaj detaloj ĝis nun restis nematuraj.

*Saluton*, proponita de E. Peltier estas sufiĉe ĝenerale uzata. En la aprila nro. de „Blanka Kruco”, 1920 sacerdote Becker el Bamberg, Polujo, jam donis plurajn proponojn pri unueca teksto de niaj ĉefaj preĝoj. J. Schröder el Vieno represas tiujn proponojn en EK 1920, 66-68. B. proponas: *Ave Maria*, kaj J.S. aldonas: „La akcepto de *Ave* ŝajnas al mi tute aprobinda; modela ekzemplo por tio estas la de D-ro Zamenhof mem akceptita por la lingvo: Amen”.

Same Jozefo Lintl en EK 1922, 203: ĉu la saluto „Ave Maria” ne estas jam internacia esprimo, almenaŭ por la tuta katolikaro? En la... Esperanta poezio mi ne malofte legis la saluton „Ave Maria”... Se oni permesas en poezio diri „Ave Maria”, kial ne ankaŭ en prozo?... Mi timas, ke la esprimo „Saluton Maria” postulos longan tempon por sia hejmiĝo, supozite ke ĝi iam hejmiĝos.”

2) *Plena je favoroj* certe ne plaĉas. Ĉu *gracoplena* estas la plej bona solvo? Francesko de Paŭla Clemente proponis: *plena de favoro*. Estas plibonigo, ke li evitas *je*. Ĉu *plena de graco* ne kunigas ambaŭ plibonigojn? Jam en 1920 J. Schröder skribis: Pro..., plia soleneco mi preferus: *plena de graco* anst. *gracoplena*.

3) Same jam en 1913 Fr. de P. Clemente proponis: *Patrino de Dio* anst. *Dipatrino*. Patro M. Carolfi lin sekvas en 1931 kaj en 1948. Efektive *Patrino de Dio* sonas pli solene; la vorto *Dio* jam estas tiel mallonga, ke ĝi ne facile kiel radiko estas uzata. Pro tio la radiko *Di*’ne ŝajnas taŭga por ofta uzo en poezio, kaj speciale ne kiel rimvorto! Ni prefere uzu la vorton *Dio* en ĝia pleneco.

4) *ventro - karno - korpo -- sino - utero*. Jen la kvinopo, kiu montras la necertecon en la traduko de unu el la pli delikataj punktoj de niaj ĉefaj preĝoj. Ne temas pri detalo nur en la Ave Maria a), ĝi krome troviĝas en la himno Ave Reĝino b), en la Litano de la plej Sankta Koro de Jesuo c), kaj en la Tedeumo d).

Unue ni donu la latinajn tekstojn:

a) Et benedictus fructus *ventris* tui, Jesus.

b) Et Jesum, benedictum fructum *ventris* tui, nobis post hoc exilium ostende.

c) Cor Jesu, in *sinu* Virginis Matris a Spiritu Sancto formatum.

d) Tu ad liberandum suscepturum hominem, non horruisti Virginis *uterum*.

Ĉiuj 13 preĝlibroj posedas tradukojn de a); 7 de b); 5 de c); 3 de d). Nur Migrukunmi de Fr. Clemente, Katolika Preĝlibro de M. Carolfi (1-a eld. 1922) kaj Tutmonda Laŭdo posedas la kvar tekstojn. Fr. Clemente eĉ ĉiujn kvar terminojn uzas: a) korpo; b) karno; c) ventro; d) sinon! M. Carolfi uzas: a) b) c) ventro; d) utero. En postaj eldonoj M. Carolfi tamen uzas: 1931 a) korpo; 1948 a) c) sino.

Por kompletigi la rezulton de nia esploro ni indiku la oftecon de ĉiu termino:

- a) ventro 4, karno 3, korpo 4, sino 2;
- b) ventro 1, karno 1, korpo 4, sino 1;
- c) ventro 3, sino 2.
- d) utero 1, sino 2.

En la plej malnovaj eldonoj oni pli uzas: ventro; poste: korpo. Niaopinie la terminoj *korpo* kaj *karno* estas tro malprecizaj; *ventro* kaj *utero* akcentas tro la biologian funkcion; nur *sino* indikas kune la homan kaj la biologian funkciojn, sed unue la homan karakteron de la patrineco kaj nur oblikve la biologian funkcion. Kp *sino* en PV. Tial *sino* ŝajnas la plej preferinda termino.

Jen la tradukoj en Tutmonda Laŭdo:

- a) Kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.
- b) Kaj montru al ni post ĉi tiu ekzilo Jesuon, la benatan frukton de via sino.
- c) Koro de Jesuo, de la Sankta Spirito formita en la sino de la virga Patrino.
- d) Vi por liberigi la homon ne timis Virgulinan sinon.

Pli larĝan intereson posedas nia temo, pro tio ke pluraj tekstoj en la Nova Testamento enhavas la saman terminon! Vidu: Lk 1;31, 41, 42, 44; 11,27; 16,22, 23; Jo 1,18; 3,4; 7,38.

Kie temas pri indiko de la patrineco aŭ pri la homa internaĵo ĝenerale kiel en Jo 7,38, la Brita eldono de la Biblio ĉiam uzas *ventro*. Pri Lazaro estas rakontata, ke li estas en la *sino* de Abrahamo, Lk 16, 22-23.

Specialan atenton meritas Jo 1,18, kie pri la Vorto de Dio estas atestata: „kiu estas en la *sino* de la Patro”. Tiu ĉi intima rilato inter la Patro kaj la Filo estas senfine pli granda ol tiu inter Abrahamo kaj Lazaro: la Filo ja eterne vivas en la Patro, kun kiu Li estas perfekte unu.

Tiel ni ankaŭ prave diras, ke persono kiu ricevas la sanktan Bapton, estas akceptata en la sinon de la Eklezio, nia patrino. Do ankaŭ pro tiuj lingvaj rilatoj la termino *sino* ŝajnas preferinda.

**H. G. Wannemakers. S. J.**

(el Espero Katolika, aprilo 1960, p. 72)

*Do, “Saluton Maria” ne havas unu nuran aŭtoron. Sed pastro Wannemakers, per sia artikolo, multe kontribuis al la prilaboro de definitiva versio en Esperanto.*

**Carlo SARANDREA**

*Saluton, Maria, gracoplena. La Sinjoro estas kun vi.*

*Benata vi estas inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.*

*Sankta Maria, Dipatrino, preĝu por ni pekuĵoj nun kaj en la horo de nia morto. Amen.*

**RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto**

*La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21.20 MET (20.20 UTC)*

**DIMANĈE - daŭro 8'** - frekvencoj: MO 585,1530 kHz - KO 4005, 5885, 7250, 7435 kHz. *Satelite:* Eutelsat 2 (13° E) transponder 54 (Bouquet Sky), vertikala polarizado, 11804 Mhz, aŭdkanalo E, 128 Kbit/s.

**MERKREDE KAJ JAŬDE - daŭro 9'** - frekvencoj: MO 1260, 1611 kHz - KO 6185, 7355 kHz. *Satelite:* Eutelsat 2 (13° E), vertikala polarizado, frekvenco 11804 MHz, dua aŭdkanalo (TelePace), FEC 2/3, S.R. 27.500. **Oni povas aŭskulti ankaŭ per la Interreto:**

[http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on\\_demand.asp](http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp)

*Granda arkivo:* <http://www.radio-vatikana-esperanto.org>

*Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.*

*Skribu al:* **RADIO VATIKANA - ESPERANTO**

**SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**

**Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>**

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.




## LUMO FINE DE LA MONDO

La galega urbo Santiago de Compostela en la okcidenta Hispanujo reakiris en la lastaj jardekoj sian mezepokan signifon kiel la trian plej gravan pilgrimocelon de la kristanoj. La tombo de la apostolo Jakobo estis kaj estas la centro de la streboj de aŭtentikaj pilgrimantoj tiam kaj hodiaŭ. Ankaŭ min kaj mian edzinon altiris en la “Sankta jaro” 2010 tiu ĉi gracoloko, kaj ni ricevis de la kapitulo de la katedralo, post la plenumiĝo de la reguloj kaj ceremonioj necesaj, la konfirman dokumenton, ke ni “pie kaj devotece” vizitis la tombon de la sanktulo.

Poste ni ne tuj reiris al nia hejmloko, sed daŭrigis, kiel faris ankaŭ en la pasinteco kelkaj pilgrimantoj, ĝis la vilaĝo Finisterre, ĉirkaŭ 90 kilometrojn okcidenten. Tie la firma lando abrupte finiĝas, dronante en la senfinan maron. Por la romianoj la Tero tie havis sian limon. Por ili vespere la Suno sinkis en senfinan oceanon kondukantan rekte al la kosmo. Konsekvence ili nomis la regionon “Finis terrae” (fino de la Tero), nocio ankoraŭ speguliĝanta en la nomoj de la vilaĝo kaj de la kabo: Finisterre en la ŝtata hispana (kastilia) lingvo, Fisterra en la regiona galega.

Ankaŭ por ni tiu mistera loko, kie la tera vojo subite ĉesas kiel la vivovojo rande al la morto, estis magia celo. Ni jam konis ĝin kiel lokon de la konsciiĝo pri la propra fino, instigo al meditado kaj interna transformiĝo, subtenata de imponiga pejzaĝo. Precipe altiris nin la kruda rokaĵo sinkanta en la foje plumbecan, foje ferocan maron. Tiu limo inter tero kaj akvo, inter lumo kaj malhelo, inter esto kaj malesto, inter vivo kaj morto estis la celo de niaj subkonsciaj sopiroj.

Iun tagon tie, travagante la marbordan pejzaĝon, ni atingis vilaĝorande la kastelon de San Carlos kun ĝia Muzeo de la fiŝkaptado (*Museo da Pesca*). Estiĝis rapide kontakto kun ties direktoro, Alexandre Nerium, kiu prezentis sin kiel poeto en la lingvo galega. Tuj evidentiĝis komunaĵoj kaj simpatio. Ĉar li en la muzeo kolektis literaturaĵojn pri Fisterra, li baldaŭ invitis min krei poezian tekston pri Fisterra aŭ la loka regiono “*Costa da Morte*” (Marbordo de la morto). Por





la transdono li fiksas la venontan tagon kaj jam antaŭvidis intervjuon kun la regiona gazeto “Voz de Galicia”.

Senhezite, ankoraŭ vespere, mi verkis poemon en la germana kaj la kastilia lingvoj paralele. Ĝi limiĝis al kernaj vortoj en la kastilia, pri kiuj mi disponis ankaŭ meznoktatempesen vortaro. Matene mia edzino tradukis la tekston en Esperanton, por enkonduki ankaŭ tiun ĉi “lingvon de la paco” en interkulturan renkontiĝon.



Venonttage akurate je la 17a horo jam atendis nin Alexandre Nerium kun raportista-fotista teamo. Dum la kunveno mi deklamis la kastilian version de mia poemo, rapide glatigitan de Alexandre. Mia edzino prezentis ĝin en Esperanto, kio multe impresis la ĉeestantojn. La renkontiĝo kun la reprezentantoj de la galega gazetaro temis pri internaciaj kontaktoj pere de la literaturo. Ĝi fakte rezultigis artikolon kun foto.

### Vivovojo

Naskiĝinte el la mallumo  
Metite sur vojon  
Por iri la straton  
Sub la steloj  
Kun homoj bonaj kaj malicaj  
Pasante lokojn sanktajn  
Kabanojn mizerajn  
Ruinojn de epokoj  
Florojn modestajn  
Dezertojn kaj herbejojn  
Montojn kaj valojn  
Ĝis la fino de la Tero  
Super la akvo senfina  
Alte sur kruta rokaro  
Transformite en anĝelon  
Sin levi al la suno  
Flugi  
Al la lumo eterna

Rapide pasis niaj kelkaj tagoj fine de la Jakoba vojo. Ni enplantis la lumon de Fisterra en niajn mensojn: la blankan, grizan, nigran de pluvaj, ŝtormaj horoj kaj la oran de majestaj sunsubiroj trans la horizonton - lumon ĉefine de la mondo, lumon de la transa mondo.

**Franz-Georg RÖSSLER**

## Ni funebras kaj kondolencas



**S-ro Aldo ROTATORI**

(Ostra Vetere, Ancona, 21/9/1938 - Romo, 4/4/2011, Italio)

Li estis la presisto de ĉi tiu revuo, al kiu li sentis ligitecon ĉar ĝi estis unu el liaj delongtempaj produktadoj. Kaj fakte la unua numero de li presita estis tiu de januaro 1978: neniu alia presisto ekde 1903 prizorgis la presadon de Espero Katolika tiom longtempe kiel li. Iusence nia revuo “kreskis” samtempe kun lia firmao: komence temis pri plumba kompostado de blanknigra revuo en ne granda sidejo. Nun nia revuo estas realigata en granda presejo per plej modernaj kaj imponaj aparatoj kaj tute kolora – la kolorojn ni ŝuldas cetere al lia amika instigo kaj al la “bona pritrakto rezervita al malnova kliento”. S-ro Aldo estis tre simpatia persono en humaneco, sed paroli kun li pri farendaĵoj foje estis komplike: por li ĉio estis facila, farebla, farinda, senprobleme. Mankis nur preciza respondo al demando: “kiam?”. Fakto estas, ke ĉiujn proponatajn laborkomisiojn li akceptis, sed mankis al li organizado. Tio absolute ne ŝuldiĝis al manko de profesio, sed al la fakto, ke por li ne ekzistis horaroj, nur la laboro. Foje li sonoris je la C.O. de IKUE por liveri la presitan revuon ankaŭ post noktomezo, ĉar hejme li enuis kaj volis labori. Bedaŭrinde tia ega laboremo kostis multege da fizikaj fortoj, kiuj dum la lastaj monatoj komencis malaperi. Dum li planis hejme farendaĵojn li forpasis abrupte en la brakoj de siaj edzino kaj filino. Al ĉi-lastaj, kiuj daŭrigas lian grandan laboron, nian sinceran kondolencan.

**S-ro Mario CANEVARI** (Romo, 5/8/1917 – Velletri, 22/5/2011, Italio)

Armeano de la prestiĝa itala korpuso de la “*Granatieri di Sardegna*” (grenadistoj de Sardinio, kies origino datiĝas de la jaro 1659) Mario, nepo de senatano Alfredo de la Itala Reĝlando, kaj kiu devenis el urbo Viterbo, estis esperantisto ekde pli ol 50 jaroj, el tiu speco de esperantistoj kiuj laboras silente, sen titoloj nek volo unuarangi. Tio fontis el lia diskreta kaj sobra karaktero, kiuj, aldone al la rigoreco kaj precizeco al kiu sin tenas soldato, karakterizis la multajn servojn, ankaŭ tiujn plej simplajn kaj humilajn, kiujn li faris por la E-movado, ĉefe tiu katolika. En Romo li estis la helpanto dum la Mesoj celebrataj en Esperanto en Romo - de pastro Giacinto Jacobitti, komence, kaj de pastro Carlo Musazzi, poste:



li legis ĉiujn bibliajn legaĵojn kaj preĝojn de la fidelularo, ĝis kiam la esperantistoj komprenis, ke tio okazis ĉar li – pro sia diskreteco – ne “kuraĝis” proponi tiun taskon al aliaj. Li estis konsiliano de la roma IKUE-grupo, sed laŭ spirito de profunda sindonemo li ne hezitis fariĝi eĉ “leterportisto” de la cirkuleroj de tiu grupo, traŭrante ĉiufoje la tutan urbon, malgraŭ siaj problemoj kun kruro, sur kiu li havis neresaniĝantan ulceron, rezulton de frostigo en Ruslando dum la dua mondmilito. Eble niaj legantoj rememoras lian voĉon, ĉar dum multaj jaroj li estis parolisto de la E-elsendoj de Radio Vatikana, ekde ilia komenco en 1977, ĝis kiam, post la forpaso de la edzino, Maria Antonietta Pandolfini (la 22an de januaro 2005, 81-jaraĝa), li translokiĝis el Romo al apuda urbeto Velletri por loĝi kun sia filino. Kolektanto de armeaj objektoj de lia arma fako, lia kolektemo koncernis ankaŭ esperantaĵojn – ĉefe temis pri kongresaj glumarkoj kaj stampoj – kaj sankt-bildetojn, kiujn li precize katalogis kaj ordigis. En la lastaj monatoj li estis trifoje enhospitaligita pro aĉiĝo de sanstato, ĉefe pro malbona spirado kaj nefunkciado de renoj. Dum sia vivo, kiel armeano, li amis ripeti: “Mi estas *maljuna soldato*, do mi kutimiĝis je suferado”. Sed en la lastaj vivohoroj, kiam jam de kelkaj tagoj la bloko de renoj kaŭzis al li terurajn dolorojn kaj korpan misĝurigojn, kaj lia parolo konfuziĝis, lia lasta klarmensa frazo estis: “Mi estas *kristano*: la morto ne timigas min”. Liaj amemo kaj ĝentileco trovis plian, lastan konfirmon en la atestoj de flegistoj kaj kuracistoj de la hospitalo de Velletri en kiu li forpasis: ili kvazaŭ plorante ripetadis al lia filino: “mortis nia kara Marieto”. Ankaŭ por la funebra rito lia diskreteco unuarangis: li disponis, ke ĝi estu tute privata. Li ripozas kun siaj gepatroj kaj sia edzino en la roma monumenta tombejo “*del Verano*”.



**Mons-ro Karel OTČENÁŠEK**  
(České Meziříčí, 13/4/1920  
Hradec Králové, 23/5/2011, Ĉeĥio)

La Sinjoro venigis en la ĉielan patrujon unu el siaj bravegaj kaj fidelaj servistoj, la patrono de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio, karega ĉefepiskopo. Li pastrigis la 17/3/1945. Li estis nomumita apostola administranto de diocezo Hradec Králové la 30/3/1950 kaj unu monaton poste li estis konsekrita titulara (sensitive) episkopo. Nur la 21/12/1989 li povis esti nomumita episkopo de Hradec Králové. Pli ol 10 jarojn li suferis sub komunista jugo en malliberejo. Post liberigo li, episkopo, laboris kiel laboristo en laktofabro, poste li povis plenumi ekster sia diocezo servon de simpla pastro sub konstanta spionado kaj nur post falo de komunista sistemo li povis reveni kiel sideja episkopo (nomumo: 21/12/1989). Oni povas lin taksi martiro de la komunista regado. La postan jaron, post la restarigo de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio, li volonte akceptis patronecon sur

ĝi. Sepfoje li vizitis la ĉeĥan IKUE-tendaron en Sebranice, por celebri E-lingvan Meson kaj por kuraĝigi la tendaranojn. Ankaŭ la tendaranoj je lia invito pilgrime vizitis la katedralon de la Sankta Spirito en Hradec Králové, kie li celebris por ili E-lingvan Meson. Pro malsano li ne povis veni al la 48a IKUE-kongreso okazinta en Olomouc 1995, sed li havigis sian E-lingvan homilion. Aliajn Mesojn en Esperanto dum IKUE-kongresoj en Ĉeĥio li celebris en Sankta Hostyn en 2002 (55a IKUE-kongreso en Kroměříž) kaj en 2006, kiam li alfrontis, kvankam malsana, lacigan vojaĝon al Velehrad okaze de la 59a IKUE-kongreso. Ĉiam li memoris pri la ĉeĥa IKUE-sekcio, sendante kristnaskajn kaj paskajn bondezirojn. Lasta bondeziro de li ricevita estas la ĉi-jara paska. La funebra rito okazis la 3an de junio en la katedralo de la Sankta Spirito en Hradec Králové, en kiu li estis entombigita. Certe li jam ĝuas feliĉon en brakumo de la ĉiela Patro kaj certe elĉiele li plu helpados nin.

#### **S-ro Ludvík CHYTL**

(Žlutava apud Napajedla, 2/7/1929 – Přerov, 23/5/2011, Ĉeĥio)

IKUE-ano, li esperantistiĝis en 1953 kaj komencis vizitadi kongresojn kaj konferencojn eksterlande. Li estis eksprezidanto de la E-klubo de urbo Přerov, kiun li kunfondis kaj kies “motoro” li estis dum multaj jaroj. En 2004 li ricevis Medalon “J. A. Komenio” de la magistrato de Přerov, pro propagando de la urbo per Esperanto: fakte li esperantigis multajn propagandajn materialojn pri sia urbo, kunlaborante kun urbaj institucioj. Li estis ankaŭ aŭtoro de pluraj alitemaj verkoj (ekz.: enkonduko de studaĵo “100 jaroj de Michalov” de Jiří Lapáček, historio de Esperanto en Přerov ekde 1923).



*Ripozon eternan donu al ili, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al ili.*

*Ilí ripozu en la paco. Amen.*



KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA (KELI) kongresos en la jaro de sia 100-jariĝo (1911-2011) en Poděbrady, Ĉeĥio, de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto 2011. Invitilon kaj aliĝilon oni trovas je la ret-adreso: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/keli-kongreso-356.html>. Aŭ oni petu informojn skribante al Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. Telefono: (+420) 325615651. E-mail: <cea.polnický@quick.cz>. La kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

## LA EŬKARISTIA MIRAKLO DE LUDBREG

Jaro 1411: pastro celebras Meson en la kapelo de la kastelo de grafo Batthyany en Ludbreg. Dum la konsekro de la vino la pastro pridubas la veron de la transsubstanciĝo, kaj jen, la vino en la kaliko fariĝas sango. La pastro, konfuzita, kaŝis la relikvon en masonita niĉo malantaŭ la ĉefaltaro. La homo kiu prizorgis la laboron estis devigita ne paroli pri la okazintaĵo. Ankaŭ la pastro konservis la sekreton, kiun li malkaŝis nur mortante. Tuj post anonco, la evento rapide diskoniĝis kaj fideluloj komencis pilgrimi al Ludbreg.



Kelkan tempon poste oni portis al Romo la relikvon kiu restis tie dum kelkaj jaroj, sed la popolo de Ludbreg daŭrigis siajn pilgrimojn al la kastela kapelo. Komence de la 16a jc., dum la papado de Julio la 2a, oni arigis en Ludbreg esplorkomisionon pri la faktoj ligitaj kun la eŭkaristia miraklo. Multaj personoj atestis, ke ili ricevis miraklan resaniĝon dum ili preĝis fronte al la relikvo.

La 14an de aprilo 1513 papo Leo la 10a per propra buleo rajtigis la honoradon de la relikvo, kiun li mem plurfoje portis en procesio tra la stratoj de Romo. La relikvon oni poste redonis al Kroatio. Dum la 18a jc. norda Kroatio estis turmentata de pesto. La popolo sin turnis al Dio por petegi helpon kaj

la samon faris la kroata parlamento: dum kunsido en Varazdin, la 15an de decembro 1739 ĝi faris solenan voton konstrui kapelon en Ludbreg honore al la eŭkaristia miraklo se la pesto malaperas. La epidemio finiĝis sed la promesitan voton oni povis realigi nur en 1994, post la restarigo de demokratio en Kroatio.

En 2005, en la vota kapelo, pentristo Marijan Jakubin realigis grandan freskon de la lasta Vespermanĝo. En la fresko Kristo tenas en sia mano la Hostimontrilon entenantan la relikvon de la eŭkaristia

miraklo. En la artverko estas bildigitaj ankaŭ la kroataj beatuloj kaj sanktuloj. Anstataŭ sankta Johano apostolo estas beata Ivan Merz, enlistigita de la Sinodo de la Episkopoj pri la Eŭkaristio (okazinta en Romo de la 2a ĝis la 23a de oktobro 2005) en la vicon de la 18 pli gravaj eŭkaristiaj sanktuloj en la historio de la Eklezio.

Komence de septembro, dum unu semajno, oni solenas la t.n. "Sveta Nedilja" (sankta dimanĉo) honore al la Eŭkaristia Miraklo okazinta en 1411. Sed dum la tuta jaro la valora sango de la miraklo altiras al Ludbreg milojn da fideluloj: inter ili ĉi-jare estos ankaŭ la IKUE-anoj kongresantaj en Zagrebo.

**Ludbreg estos unu el la etapoj de la 64a KONGRESO DE I.K.U.E. kiu okazos en (la koro de) ZAGREBO, Kroatio, de la 16a ĝis 22a de julio 2011.** Kvankam ĝi ja estas IKUE-kongreso, tamen ĝi volonte malfermas siajn pordojn al ĉiuj, kiuj deziras sincere ekkoni kaj sperti, laŭ spirito de reciproka komprenemo kaj respekto, sen devigaj reguloj, la agadon de IKUE kaj travivi fratan medion. La kongresejo estos la granda ĉefepiskopa seminario apud la katedralo de Zagrebo, en la urbocentro. Je dispono estas plejparte unutilaj ĉambroj, ĉiuj kun banĉambro. La partoprenokosto varias de 220 ĝis 325 eŭroj, kiu inkluzivas loĝadon, manĝojn, ekskursojn. Aldoniĝas aliĝkotizo. Petu informojn je la adreso: [kroatio2011@gmail.com](mailto:kroatio2011@gmail.com), aŭ vizitu la paĝon [www.ikue.org/kong2011/index.htm](http://www.ikue.org/kong2011/index.htm), aŭ skribu al la C.O. de IKUE (adreso en la dua kovrila paĝo).